


# Sonorilo

63-a jaro, n-ro 1

januaro-februaro 1971
BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

# Sonorilo

DUMONATA BULTENO DE B.E.F.

REDAKCIO: Roose Fernand, Sint-Klaradreef 59, Brugge Tel. (050) 319.81
Maertens Grégoire
Poupeye Charles

ADMINISTRADO: Balleux René, Oude Donklaan 83, 2100 Deurne

Belga Esperanto-federacio

ASOCIO SEN PROFITA CELO — SIDEJO
Sint Bernardse Steenweg 1078, Hoboken. Tel. (03) 276643

HONORA ĜENERALA PREZIDANTO
Jaumotte Maurice (†)

HONORA PREZIDANTO
D-ro Kempeneers Paul

HONORA VICPREZIDANTO
Sielens Henri

FEDERACIA PREZIDANTO
D-ro Denoël Pol, 20 rue V. Raskin, Liège

PREZIDANTO
Debrouwere Gerard, Magdalenastraat 29, Kortrijk

VICPREZIDANTOJ
Jacobs R. – Roose Fernand

ĜENERALA SEKRETARIO
Verstraeten Jules, St. Bernardse Steenweg 1078, 2710 Hoboken

SEKRETARIO POR LA NEDERLANDLINGVA REGIONO
Maertens Grégoire, Prins Leopoldstr. 51, 8310 Brugge (Sint-Kruis). Tel. (050) 349 35

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO
Paulus Raymond, 73 rue de Montignies, Charleroi

KASISTO Balleux René, Oude Donklaan 83, Deurne

POŜTKONTO DE B.E.F.: 1634 34 OUDE DONKLAAN 83, 2100 DEURNE

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
F-ino Orsolini A., rue P. Pastur 6, 6000 Charleroi. P.K. 2016 40

# 9-a MARKOLA KONGRESO

53-a B.E.F. KONGRESO
FEDERACIA RENKONTIĜO DE S.O.E.F.
JARA KONGRESO DE N.F.E.F.
1-a MARKOLA JUNULARKONGRESO

**29-31 majo 1971 – CALAIS (Francujo)**

**Sub la Honora Prezidanteco de**

| | |
|---|---|
| S-ro Pol DENOËL | Prezidanto de B.E.F. |
| S-ro G. STEPHENSON | Prezidanto de S.O.E.F. |
| S-ro Georges ODENT | Prezidanto de N.F.E.F. |

Loka Kongresa Komitato:

| | |
|---|---|
| Prezidanto | S-ro R. BUERICK |
| Sekretario | S-ro F. DITACROUTE |
| Kasistino | S-ino M. BUERICK |
| Loĝado | S-ino FERMON |
| Junulaj Aferoj | S-ro Yves-Marie FERMON |
| | F-ino Isabelle FERMON |
| | S-ro Patrick DELALAING |
| Membroj | S-ro J. DUCROCQ |
| | S-ro M. PIERRU |

## INFORMOJ

| | |
|---|---|
| **Akceptejo** | ĉe "Maison du Tourisme" (Turismoficejo) apud la Stacidomo. |
| **Kongresejo** | Urbodomo de Calais. |
| **Korespondadreso** | S-ro Fernand DITACROUTE, 178 Chemin Castre, F-62-CALAIS, Francujo. |
| **Pago** | al P.ĉ.K. LILLE 4 356.09 – "Congrès Espérantistes du Détroit"; aŭ al PK 1969 06, s-ro G. Debrouwere, Magdalenastr. 29, B 8500 KORTRIJK, Belgujo. |
| **Aliĝkotizo** | £0.75 aŭ 100 B.F. aŭ 10 F.F.. ½ por familianoj kaj junuloj ĝis 25-jaraj. Limdato: la 15-a de majo. |
| **Bankedo** | po 20 F.F. por persono (trinkaĵoj inkluzivitaj). Ebleco pri memserva manĝo: 9 F.F. |
| **Loĝado** | (Rezervado *nepre* antaŭ la 5-a de majo.) Antaŭpago de minimume 1 nokto estas postulita. |

Hotelo 1-a kategoria: 10 ĝis 20 F.F. po ĉambro.
" 2-a " 20 ĝis 30 F.F. "
" 3-a " 30 ĝis 60 F.F. "

Junulargastejo kaj taŭge aranĝita kampadejo: petu informojn.

# 9-a Markola Kongreso

## ALIĜILO

resendota al jena adreso:

S-ro DITACROUTE, 178 Chemin Castre, F-62-CALAIS

La subskribinto,

Nomo............................................. Antaŭnomo..........................................

Adreso..........................................................................................................

aliĝas al la 9-a Markola Kongreso.

.................. familianoj akompanos min.

Mi partoprenos la dimanĉan bankedon. (1)

Mi pagas al P.ĉ.K. LILLE / al la enlanda konto (1)

..........kongreskotizo(j)n je FF 10,– / BF 100,– / £ 0,75 ....................

..........kongreskotizo(j)n je FF 5,– / BF 45,– / £ 0,38 ....................
(por familianoj kaj junuloj)

.......... sidloko(j)n ĉe la dimanĉa bankedo, je FF 20,– ....................

..........kiel antaŭpagon por hotelo ....................

..........kiel personan donacon ....................

SUME ....................

Krome, mi deziras ricevi .......... fervojajn kongresrabatilojn.

Bv. turni.....

Mi alvenos la ....................(dato) je la ....................(horo)
per aŭto / fervojo (1).

Mi foriros la.................... je la ....................

Mi deziras okupi en hotelo 1- / 2- / 3-a-kategoria (1)
.......... ĉambro(j)n kun .......... lito(j) 1 / 2-persona(j) je FF ..........
..........ĉambro(j)n kun .......... lito(j) 1 / 2 -persona(j) je FF ..........
.......... ĉambro(j)n kun .......... lito(j) 1 / 2 persona(j) je FF ..........
(proksimumaj prezoj)

RIMARKOJ:

ĉe.............................................., la .......................... 1971.
(subskribo)

(1) Forstreku la senutilaĵojn.

## La Kongreso de la Belga Esperanto-Federacio en 1971

Pasintjare ni okazigis nian nacian kongreson en pli larĝa kadro, nome en la kadro de la Trilanda kongreso en Aachen. En 1971 ni faros la saman. Sed nun ni iros al la okcidento kie ni elektis la jam faman „Markola"-n kongreson. Ĉiuj ankoraŭ memoras la kongreson kiun ni havis en Brugo. Vi scias ankaŭ ke, malgraŭ tre multaj malfacilaĵoj, kelkaj „obstinuloj en la bona senco de la vorto" – kiel ekz. s-ro Doyelle el Bourboug – energie laboris por daŭrigi kaj sukcesigi tiujn kongresojn de angloj, francoj kaj belgoj. Dank'al ilia persista laboro tiuj kongrestagoj realiĝis kiel tre bonaj kaj belaj esperantotagoj. Do, ni iros al Calais (Kalezo) por festi samtempe kaj nian nacian kaj la markolan kongresojn. Ĵus ili eldonis la unuan numeron de nova revueto „La Markolano", senpage ricevebla.

### PROVIZORA PROGRAMO

| | |
|---|---|
| **Sabato 29** | |
| Matene | Akceptado de la kongresanoj ĉe "Maison du Tourisme". |
| Posttagmeze | Vizito de la urbo (libervola). |
| 20.00h | Interkona Vespero. |
| **Dimanĉo 30** | |
| 08.00/08.30h | Diservoj (informoj pri la lokaj preĝejoj surloke). |
| 09.30h | Apartaj kunvenoj por B.E.F., S.O.E.F., N.F.E.F. |
| 10.30h | Kunsido de la 3 Estraroj. |
| 12.00h | Oficiala Akcepto de la Urbestraro. |
| 12.30h | Foriro de la aŭtobusoj al Tournehem. |
| 13.15h | Bankedo. |
| 15.30h | Gvidata vizito de la loka historio- kaj arkitekturoriĉega preĝejo kaj paroladeto pri la antikva historio de la regiono. Krome, surloke estas eblaj multaj distraj okupoj: vizito de la agrablaj ĉirkaŭaĵoj, promenado tra la parko, remado, golfludo, k.t.p.... |
| 17.00 ĝis 19.00h | Ebleco reiri al Calais, aŭ vespermanĝi en Tournehem antaŭ reveno, laŭvole. |
| 20.30h | Distra vespero. – Dancado. |
| **Lundo 31** | |
| 10,00h | Komuna kunsido de la Markolanoj. |
| Ekde la 14.00h | Adiaŭa rendevuo ĉe "Maison du Tourisme". |

**B.E.J.A.:** La junulargrupo de Sint-Kruis aŭtobuse vojaĝos al Calais forirante je la 13.30 h el Sint-Kruis (Kerkplein) sabate la 29.5.1971 kaj revenos vespere de la dimanĉo; gejunuloj de BEJA povas aliĝi. La kostoj por la vojaĝo en la aŭtobuso (ankaŭ uzebla dum la kongreso!), unu tranoktado en junulargastejo kun matenmanĝo, kaj la kongreskotizo estas entute 300 B.F., pagota al PK 2914 29 de Maertens G., Pr. Leopoldstraat 41, Sint-Kruis. Plenkreskuloj kiuj ŝatus kunvojaĝi – ili mem zorgu pri loĝado, kotizo, ktp. – pagu je la menciita PK la sumon de 150 B.F. (do nur por la vojaĝo).



## Sonorilo

**presita laŭ ofseta sistemo en kunlaboro kun la Centra Oficejo de UEA**



Tiu ĉi unua numero de *Sonorilo* en nova formo estas la unua el la ses kiuj aperos ankoraŭ ĉi-jare; la unua numero pro diversaj kialoj aperas iom post la antaŭvidita dato, sed nun tuj, ni diru komence de majo, aperos la dua numero. La redakcio esperas ke la formo plaĉas al vi kaj ni zorgos por la regula aperado, kunlabore kun la centra oficejo al kiu ni ŝuldas multan dankon pro la akcepto de tiu plia tasko por la esperanto-movado.

## FONDAĴO M. Jaumotte - Loquet

**FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO**

| | | |
|---|---|---|
| transpreno | | 131.505 BF |
| S-ro Jacobin Frank (Antverpeno) | 1.000 | |
| Anonime "Verda Stelo" | 1.000 | |
| S-ino Van Ginderen-Martens (Essen) | 400 | |
| S-ino Govaerts (Antverpeno) | 100 | |
| entute | | 134.005 BF |

**Koran Dankon!**

(Pagoj akceptataj pere de la pĉk 2914 29 de Maertens Gr., Sint-Kruis.)



**TEKSTOJN por la numero „marto–aprilo" tuj ensendu, ni petas!**

# 56-a Universala Kongreso de Esperanto 31.7 – 7.8.1971

**„Jen Londono"**

Libron pri la sciindaĵoj de Londono oni tradukis en Esperanton speciale por la Universala Kongreso. „Jen Londono" estas la titolo, kaj ĝi aperos en bone konata serio „Ladybird". La libro estos havebla por la kongresanoj en 1971.

**Salutu la kongreson**

La Loka Kongresa Komitato anoncas novan planon, laŭ kiu individuoj povas saluti la partoprenantojn de la Universala Kongreso. En la Kongreslibro aperos aparta sekcio speciale por salutoj kaj anoncetoj. Ĉu por saluti amikojn, ĉu por informi pri la loka societo, aŭ eĉ por reklami komercon. Ĉion ĉi la LKK ofertas je tre modera prezo: 10 ŝilingoj (4,35 gld) por la unua linio, t.e. 40 literspacoj, kaj 5 ŝilingoj (2,18 gld) por ĉiu aldona linio aŭ parto de linio. La anoncojn kun antaŭpago oni sendu al: Loka Kongresa Komitato de la 56-a Universala Kongreso (s-ro Ian Fantom), 140 Holland Park Ave., London W11 4UF, Britujo. Brita ĝirkonto: n-ro 335 8151.

**Proksimaj loĝejoj**

Jam rezervitaj estas de la loĝiga servo kelkaj studentaj loĝejoj je modera prezo (por unu- aŭ dulitaj ĉambroj ĝi varias inter 102 gld kaj 127 gld por tuta semajno, inkluzive de matenmanĝo). Ili situas plejparte tre proksime aŭ relative proksime al la kongresejo. Detaloj pri tiuj kaj aliaj loĝejoj aperos en la Dua Bulteno.

**La 'buso ankaŭ sur poŝtkarto**

Jen aperis speciala poŝtkarto okaze de la 56-a UK, bildiganta la konatan londonan aŭtobuson laŭ originala desegnaĵo de K.T. Bartoŝik. Tiamaniere venas al esperantistoj unika ebleco kombini personan korespondaĵon kun utila reklamado de la Universala Kongreso. La prezo de 5 ekzempleroj estas 1,— gld (por Nederlando 1,12 gld) plus la kutimaj sendokostoj. Al pokvanta mendo aplikiĝas 33%-rabato. La mendojn administras la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

**Statistiko (15.4.1971)**

Entute 1531 aliĝintoj el 36 landoj.





**Akcepto ĉe la Lordurbestro**

La alta protektanto de la Kongreso invitis ducent reprezentantojn de la Universala Kongreso renkonti lin kaj aliajn altrangajn urbkonsilistojn lunde, la 2-an de aŭgusto 1971. La LKK decidis transdoni la invitilojn al la komitatanoj de UEA, membroj de la Akademio, prelegontoj de Internacia Somera Universitato kaj kelkaj aliaj aktivuloj en la movado.

**Filatela ekspozicio ĉe la UK!?**

La Loka Kongresa Komitato volonte akceptos proponojn de individuoj aŭ grupoj filatelistaj por elmontri interesajn (laŭtemajn) kolektojn de poŝtmarkoj kaj eventuale poŝtstampoj. Preferitaj estos jam pretaj aranĝoj kun rilato al Esperanto, la lingva problemo, aŭ la kongreslando.

**Aplaŭdoj por la sonbendo**

Vere sukcesa fariĝis la reklama kaj propaganda sonbendo pri Londono preparita de LKK-ano Peter Schilperoord (1, Heron House, Church Grove, Hamton Wick, Kingston upon Thames, Surrey, Britujo). Dum mallonga tempo alvenis multaj mendoj el Svedujo, Francujo, Pollando, Finnlando, Ĉeĥoslovakio, F.R. Germanujo, Norvegujo, Nederlando k.a. Novaj mendoj por la sonbendo, same kiel por la kongresa afiŝo (ruĝkolora londona aŭtobuso) estas bonvenaj ĉe la supra adreso.

**Fakaj organizaĵoj aktivas**

Preskaŭ 30 fakaj organizaĵoj kunvenos enkadre de la 56-a UK. Inter ili ankaŭ diversaj filozofiaj kaj religiaj societoj, ekzemple oomotanoj, katolikoj, protestantoj, kvakeroj, spiritistoj, bibliistoj kaj islamanoj. Krome okazos tiel nomitaj interreligia kaj ekumena kunvenoj.

★

**Karavano al Londono**

Speciale por la junulargrupo de Sint-Kruis ni organizas karavanon al la kongreso en Londono, sed ĉiuj BEJA-gejunuloj kaj la BEF-anoj kiuj sentas sin junaj estas bonvenaj.

**Foriro**: el Bruĝo matene de sabato la 31.7.1971 per vagonaro kaj ŝipo.

**Kongressemajno**: loĝado en mezklasa hotelo kun matenmanĝo kaj vespermanĝo (tagmanĝo *ne* enkalkulita).

**Ekskurso**: foriro sabate la 7.8.71 al York, Edinburg, Inverness, Glasgow ktp; kun reveno en Bruĝon dimanĉe la 15.8.71; per aŭtobuso en Britujo kaj Skotlando, perŝipe kaj vagonare ekde Dovro.

**Prezo**: 8 000 F kun eventuala suplemento por unupersona ĉambro. La gejunuloj kiuj loĝos en Londono en studentaj tranoktejoj ricevos konsiderindan rabaton.

**Enskribo**: pagante 1 000 F je poŝtkonto 2914 29 de Maertens G., Prins Leopoldstraat 51, Sint-Kruis. Pliaj detaloj en aparta cirkulero por ĉiuj enskribintoj aŭ petintoj.

# ESPERANTO-TAGO en BELGUJO

La invado de tri bovinoj, gvidataj de junaj kontestantoj, en la interkonsiliĝojn de la ses ministroj pri agrokulturo de la Komuna Merkato en Bruselo, faris pli por informi pri la postuloj de la belgaj kamparanoj, ol longdaŭraj surpaperaj protestoj.

Persiste, kuraĝe, inteligente kaj lerte, ekde pli ol okdek jaroj, la esperantistoj klopodas gajni al sia afero la ĝazetaron, la oficialajn instancojn kaj la publikon. Ĝis nun, kvazaŭ vane. Eĉ UNO fermas la pordon al Esperanto.

La belgaj esperantistaj organizoj (inter kiuj B.E.F., BEJA, kaj S.A.T.-Amikaro) decidis ekagi per alia rimedo por rompi la konspiron de silento, por „devigi" la aliajn nin alrigardi.

Rekta alvoko estas farata al la konataj esperantistoj loĝantaj en Belgujo -- kaj al iliaj amikoj -- por plejeble granda koncentrado sur placo de la ĉefurbo, en la tuja apudeco de la televid- kaj radiostacioj. Ĝi ĉiuokaze apogos delegitaron, kiu deponos memorandon ĉe la supre nomitaj stacioj.

Kio ajn estu la akceptado de tiu delegitaro, la invitantaj asocioj opinias ke la surstrata koncentrado havos relative sensacian efikon, en lando, kie ankoraŭ tro ofte ni aŭdas ,,Esperanto, ĉu ĝi ankoraŭ ekzistas?". Por doni pli da pezo al la delegacio, pritraktoj, per pli tradiciaj rimedoj, estas antaŭe entreprenataj.

La esperantistaro sindoneme, sed ĉiam dise kaj po-pece, vizitas kunvenojn, renkontiĝojn, kongresojn. Ĉu, unufoje en la jaro, dum kelkaj horoj ordinare senokupaj kaj kun minimumo da elspezoj ankoraŭ reduktotaj per kolektivaj veturoj la „diligenta kolegaro" ne konsentos amasiĝi sur unu sama loko, kaj tiel, ĉiuj kune, frapi sur la saman najlon?

**ESPERANTO-TAGO en BELGUJO okazos SABATON la 8-an de MAJO 1971, je la 14-a HORO, en BRUSELO, PLACO E. FLAGEY.**

Ni celas al kreado de tradicio: la dua sabato de majo estos, ankaŭ en la venontaj jaroj, la TAGO de la LINGVO INTERNACIA.

Se ni sukcesos -- se ni estos multnombraj -- se ankaŭ VI venos, povas esti ke esperantistoj de aliaj landoj nin sekvos. VI devos senti vin fiera, partopreni tiun unuan ESPERANTO-TAGON. Vi devas esti kun ni. VI VENOS...kun viaj familianoj, kun viaj amikoj, kun aliaj simpatiantoj de la Lingvo Internacia! Al ĉiuj, BONVENON!

Por tramveturi al Pl. Flagey ekde:

1. **Fervoja Stacio „Nordo"**: (pl. Rogier): tr. 101, 102, 103, transite (8 Fr.) kun tr. 32 (tramŝanĝi ĉe halto ĵus antaŭ Port de Namur por entramiĝi en 32 -- Direkto pl. Flagey).
2. **Stacio ,,Luxembourg"**: tramo 93, direkto al pl. Flagey.
3. **Stacio Schaerbeek**: buso 5, direkto pl. Flagey.
4. **Stacio "Sudo"** (Midi): tr. 81, direkto pl. Flagey.
5. **La Borso**: tramo 32 (halto flanke de la Borso), direkto pl. Flagey.
6. **Porte de Namur**: tramo 32 (halto ĉe poŝtejo ch. d'Ixelles), direkto pl. Flagey.



## Seminario
# «LINGVO kaj KULTURO»

La lingvaj fenomenoj enkadriĝas en la socia fenomenaro. Sed meze de tiu socia fenomenaro, oni devas rezervi al ili apartan lokon; ĉar lingvo, kiel la komunikilo de la kulturo ne povas esti konsiderata kiel unu el ĝiaj plej malgravaj kaj sensignifaj aspektoj. La kulturo estas transdonita pere de ĝi, eble la kulturo devas eĉ submetiĝi al la kondiĉoj propraj kiujn proponas la lingvo.

Ĉu do lingvo lasus tian markon ĉe la kultura disvolviĝo? Kiel, kiom, kaj kiusence lingvo kaj kulturo rilatas unu kun la alia? Interne de grupo, kiomgrade la elekto de tiu aŭ alia lingvo gravas por la kultura disvolviĝo de tiu grupo?

Helpe de la plej ĝisdataj sciencaj teorioj -- en lingvistiko kaj en sociologio -- ni klopodas skizi la respondon al tiuj problemoj, problemoj kiuj evidentiĝas ne nur en la kadro de la ĝenerala socio, sed ankaŭ interne de malgrandaj grupoj kaj de organizaĵoj. La teoria studo provizos nin je instrumentoj por pliprofundigi la studon de konkretaj kazoj -- i.a. tiuj de la diversaj organizaĵoj reprezentitaj en la seminario. En ĉiu aparta kazo verŝajne aperos elementoj ne science pravigeblaj, sed nur ideologie, kio kondukos nin al konsciiĝo pri la ideologia aspekto de la lingva problemo.

La laboro estos plenumita ĉu pere de enketoj, ĉu pere de enkondukaj prelegoj de fakuloj (lingvistoj, sociologoj), ĉu pere de diskutgrupoj.

## Priskribo

Seminario pri Lingvo kaj Kulturo, 5 ĝis 12 septembro 1971, Strasburgo, Fr.

Partoprenantoj: Internaciaj Junularaj Organizaĵoj (esperantistaj kaj neesperantistaj) kaj eventuale aliaj fakuloj kaj interesiĝantoj.

Laborlingvoj (verŝajne): Franca, angla, kaj Esperanto.

Programo:
- Enketo pri la lingva problemo interne de la ĉeestantaj organizaĵoj, kaj de junularaj organizaĵoj ĝenerale.
- Enkondukaj prelegoj pri:
  - Lingvo kaj kulturo: lingvistika vidpunkto.
  - Lingvo kaj kulturo: sociologia vidpunkto.
  - Lingvo kaj kulturo: ideologia vidpunkto.
- Diskutgrupoj pri la diversaj temoj, kaj raportado de la grupaj rezultoj. Oni grupiĝos ĉu laŭ lingvoj (por lingvistikaj diskutoj), ĉu laŭ celoj de propra organizaĵo (por ideologia aspektoj).
- Vizitoj al internaciaj organizaĵoj en Strasburgo, kaj studo pri iliaj soci-lingvaj problemoj.
- Praktika studo pri soci-lingvaj problemoj de ĉeestantaj organizaĵoj.
- Redaktado de seminariaj konkludoj.

Informoj: TEJO, NEJO-komisiono, Kastelenstraat 231, Amsterdam Z, Nederlando.

# BIBLIOGRAFIO



La libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo" (s-ro Iserentant R.), Kerklaan 61, BRUĜO, Poŝtĉekkonto 152140.

„Gajaj Klubvesperoj" eldonis Dansk Esperanto-Forlag sub direktado de L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj en Danlando.
32 paĝoj. Prezo: 4 danaj kronoj.

Tiu ĉi broŝuro estos bonvena en tre multaj grupoj. Ĝi entenas 11 teatrajn skizojn (kvin estas vere tre mallongaj) kaj 4 societludojn. Ili estas ĉiuj efektive gajaj. Kompreneble multo dependas de la naturaj komikaj ecoj de la ludantoj. „Antaŭ la juĝisto" estas eĉ tre streĉa. Kial, en „La kudrilo", la aŭtoro ne mencias, post la rideksplodo, la ĝustan vorton? Ĉu por instigi la spektanton ke li (ŝi) mem serĉu? Rimarku ke la prezo estas tre malalta. La eldonanto anoncas pliajn tiajn eldonojn, i.a. de M. Boulton. Tio promesas! Samtempe tiu nelacigebla L. Friis anoncas la eldonon de originala verko de la novzelandano B. Potts.

## Korespondanonco

30-jara konstruisto el Orient-Germanujo, filatelisto, deziras korespondi kaj interŝanĝi belajn poŝtmarkojn. Siegfried Wolf, 8601 Neu-Purschwitz Nr. 82, Krs. Bautzen, D.D.R.

**Reĝa Esperantista Brusela Grupo**
**Hotelo „Excelsior",**
**strato de la Progreso 7**

## GRUPA VIVADO

MAJO 1971

03-an: EKI VESPERO (en Excelsior): S-ro VAN HUMBEECK prizorgos viglan kaj originalan „Diskut-vesperon".
08-an: sabate: ESPERANTO-TAGO, je la 14.00 h, placo Flagey, antaŭ la sidejo de la Radio kaj Televido. Neniu esperantisto povas manki tiun koncentradon, por ke oni rimarku nin; invitu viajn familianojn kaj amikojn!
17-an: Parolado (kun diapozitivoj) de s-ro LERNOUT, pri „La farmbienoj de Belgujo kaj limlandoj".
29/30/31-an: en Kalezo, MARKOLA KONGRESO. Kongreskotizo: 100 F (por familia membro: 50 F) sur P.ĉ.K. n-ro 1969 06 de s-ro DE BROUWERE.

JUNIO 1971

07-an: Parolata ĵurnalo.
16-an: merkrede, en Ministerio de Franclingva Kulturo, EKI VESPERO: Prelego de s-ro VAN AELST (kun lumbildoj): „La Delto de Sud-Orienta Francujo."
21-an: Perfektiga Kurso, fare de s-ro van der STEMPEL.

FLANDREMA GRUPO (Antverpeno)

Ni eksciis la forpason je la 2.4.1971 de samideano Fernand Volders en la 71-jaraĝo. Dum longaj jaroj li partoprenis en la Esperanto-vivo de Antverpeno, de Flandra Ligo Esperantista kaj de BEF. Ni aperigos nekrologon en la venonta numero de Sonorilo.





# KRONIKO

La fervoja bileto, kun rabato, validos por reveturo hejmen el Parizo, eĉ por tiuj, kiuj postkongresos. Pliaj informoj aperos en venonta numero.

Petu informojn kaj aliĝilojn al OKK, SAT, 67 avenue Gambetta, Paris 20$^{e}$, Francio.

LILLE

La kongreso de la Nord-Franca federacio okazos en Lille, dimanĉon la 18-an de aprilo. Rendevuo ekde la 10-a horo, en la Internacia Komerca Foiro de Lille. (Inf.: G. Odent, 17 Rues des Bouvreuils, F-62 Arras; tel. 21.05.87).

S.A.T. KONGRESO EN PARIZO

La 44-a kongreso de SAT okazos en Parizo de la 31-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 1971. Tiu kongreso, kiu solenos la 50 jarojn de la Sennacieca Asocio Tutmonda estos certe sukcesa.

La kongresantoj estos gastigitaj en Orsay, ĉirkaŭurbo de Parizo, ĉe sciencfakultato. Tiu proksimeco faciligos viziton de la ĉefurbo.

Tri postkongresaj semajnoj estos organizitaj:

La unua, apud Luaro-kasteloj, ĉe la esperantista kulturdomo Grezijon (Grésillon).

La dua en Les Houches (Alpoj), apud Chamonix (1 050 m).

La tria, en Sud-Francio, nur por tendumantoj, ĉe mediteranea marbordo (Balaruc-les-Bains).

**Bivako sur trilanda punkto**

Eckhard Woite, juna studento kaj kungvidanto de junulara domo proksime de Darmstadt, FRG, partopreninto de TESTO-5000 de Hermann Behrmann, nun iniciatas sian unuan propran planon rilate la disvastigon de Esperanto.

Li kritikas, ke la tradiciaj kongresoj, renkontiĝoj, feriosemajnoj, estas ĉefe aranĝitaj por la malpli juna generacio kaj kostas multe da mono.

Li pledas por renkontiĝoj kun programo por novaj esperantistoj, por personoj, kiuj ne jam aŭ preskaŭ ne jam parolas Esperanton; ĉar Esperanto ja estas „movado", sed ne lingvo por konservativaj veteranoj. Eŭropa Merkato, Eŭropa Unio kaj la tuta mondo nun bezonas Esperanton pli ol en iam pli frua tempo.

Eckhard Woite proponas bivakon sur iu lima aŭ eĉ sur trilanda limpunkto, des pli ĉar Esperanto ja estas kontraŭ la limoj. Li pretas organizi tian bivakon venontan someron aŭ dum alia tempo.

Interesuloj bv. turni sin rekte al la iniciatinto, stud. ped.. Eckhard Woite, D-6101 Rossdorf, Jugendhof, FRG.




RABATO POR ESPERANTISTOJ

Por ĉiuj viaj asekuroj - reasekuroj

unu adreso :

**J. VERDYCK & Co** Pvba.

**ANTWERPEN,** Lange Nieuwstr. 30

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"

Oficejoj en London - Rotterdam - Lieĝo.

Reprezentanto ĉe "Lloyd's - London"

Unuaklasa Servo Faklerta laboro.

Korespondas en Esperanto.

P. V. B. A.

**FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN**

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -
„securit" vitro
koloriĝitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko

**Telefono 272875**